



Italo - lando de gejlibera etoso p 3



Polico disigas la unuan gejan festivalon en Ĉinio p 2



Sekvoj post la atako de pola polico p 5



Kampanjo kontraŭ afrikaj gegejoj p 6



Pri la Armen-Esperanta kontribuo al la Eŭrovida Kazonkonkurso p 7



Proponoj al la jarkunsido 2
Nova retrizorganto 2
Beletra niĉo 4
El la plumo de la nova papo 6
Re-rezentado de la estraro 8

L.S.G.

Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

Retejo: <http://lsg-esperanto.org>

Adreso, retpoŝto: Vidu ĉe la sekretario-kasisto sube.

Membrigo: Kontaktu la sekr.-kasiston.

Kotizo: 10 EUR/1 jaro, 25 EUR/3 jaroj.

ESTRARO

Prezidanto:

Arnold VICTOR

Apartment. 1

160 West Eleventh Street

New York City

New York 10011

Usono;

arvimide@earthlink.net

Sekretario-kasisto:

Rolf, Germanio;

lasekretario@gmx.net /

lakasisto@gmx.de

Estrarano pri varbado:

Francis, Francio;

fsoghomonian@yahoo.fr

Estrarano:

Torstein, Norvegio;

kvakke@hotmail.com

Retprizorganto:

Randy, Usono; randy.dean@pobox.com

FORUMO – membrogazeto de LSG N-ro 131 (1/2006)

Adreso, retpoŝto, provizora redaktanto:

Andreas, Svedio;

...@....com

Kontribuoj al la gazeto ĉiam bonvenaj.

La gazeto aperas ankaŭ rete kiel PDF-dosiero. Por via integro ĉiuj eventualaj familiaj nomoj kaj adresoj estas forigitaj el la reta versio.

Ekspedo de FORUMO: La sekretario-kasisto, vidu supre. Nepre **ne** kontaktu la personon sur la etikedo de la koverta, se estas ĉefa adreso! La persono ne estas ligano. Ni nur forsendas la gazeton el Ĉeĥio pro la tieaj favoraj poŝtarifoj.

Proponoj al la jarkunsido

Eventualaj proponoj al la jarkunsido estu ĉe la estraro plejlaste 7 aprilo, vidu adreson apude. La jarkunveno okazos lige kun la Universala Kongreso en Florenco, Italio, 29 julio – 5 aŭgusto.

Nova retprizorganto

Randy el Atlanta, Usono, transprenis la prizorgadon de nia retejo <http://lsg-esperanto.org>. Se iu interesiĝas ankaŭ pri la redaktanteco de FORUMO, bv kontakti la redaktanton.

Polico disigas la unuan gejan festivalon en Ĉinio

En la brita gazeto Guardian 17 decembro 2005 oni povis legi pri la okazintaĵo. Laŭ la organizantoj de la festivalo la pekina polico disigis la unuan gejanlesban festivalon nur kelkajn minutojn post ĝia komenciĝo.

Oni atendis pli ol 400 ĉeestantojn por la tri-taga evento, sed tuj kiam ili ekkunvenis ĉe Factory 798 en la artkomplekso Daŝanzi, envenis la polico kaj ordonis forlason de la ejo. "Ili ne donis al ni kialon," klarigis organizanto Zhu Rikun. "Oni atendis ĉeeston de centoj por ĉi tiu semajnfino. Mi ne scias, kiel oni informos ĉiujn pri la malpermeso."

Nur dum la lastaj jaroj Ĉinio aboliis leĝojn, laŭ kiuj oni deklaris samseksamecon esti malsano.

Brian, Kanado (el lsg-ano)

Fonto: The Guardian, <http://www.guardian.co.uk/gayrights/story/0,,166953>

La desegnaĵo frontpaĝe bildigas la Duomokatedralon en la kongresa urbo Florenco, Italio.

Italio – lando de gejlibera etoso

En Eŭropo oni kutimas rigardi Italion kiel unu inter la malmultaj lokoj, kie vivo estas facila por gejoj. Tial, ekde la 19a jarcento multaj gejoj vojaĝis al Italio, fuĝante la rigorojn de siaj landoj, kaj tiel okazis por Lord Byron, Oscar Wilde, André Gide, Von Gloeden, k.a.



91a Universala Kongreso de Esperanto

Bonvenon al Florenco 29 julio - 5 aŭgusto!

Ankaŭ nuntempe la italaj gejoj vivas en tiu libereca etoso, kiu nuntempe estas komuna kun la ceteraj eŭropaj landoj, kaj kun Usono. Ekde la t.n. "sekse liberiĝo" fine de la 1960aj jaroj, ekaperis la unuaj asocioj por la agnosko de la "glat¹-rajtoj" kaj ekestis la unuaj distrejoj rezervitaj al geja klientaro, kaj ilia numero kreskadis kaj disvastigadis preskaŭ ĉie. En Italio Florenco estas la unua urbo en kiu aperis geja dancejo.

Por la glat-mondo ĉefe la grandaj

urboj en Italio ofertas bonan akcepton kaj gastigas la plejparton de la gejoj, dum la malgrandaj centroj ankoraŭ restas en etoso de precipe honteca timemo. Tamen, la ĉeesto, kaj ĉefe la videbleco, de gejaj kaj lesbaj paroj, kaj en grandaj kaj en malgrandaj urboj, konsiderinde kreskis dum la lastaj 20 jaroj, tiel ke jam en diversaj okazoj oni povis spekti en televido intervjuojn kaj sinrakontojn, ekzemple de la du famaj modistoj Dolce & Gabbana.

La diskriminacioj kaj atakoj (eĉ murdoj) kontraŭ samseksamuloj malpliĝas, kvankam ankoraŭ ne tute. Krom tio, oni konsideru la fakton ke, dum preskaŭ ĉiuj landoj, hodiaŭ apartenantaj al Eŭropa Unio, abolis la persekutajn aŭ diskriminaciajn leĝojn kaj ekaprobis kontraŭdiskriminaciajn regulojn, ankaŭ rajtigante la samseksajn amajn pariĝojn, Italio nenian paŝon faris antaŭen. "Punaj" leĝoj pri gejejo neniam ekzistis tie, jam estante la sociala grava hontigado de la gejoj.

La influo de la tradicia katolika religio estas tia, ke la lastaj leĝproponoj por puni la kontraŭgejajn diskriminaciojn ĉe laborlokoj kaj rajtigi la pariĝojn inter samseksaj homoj, estas kontraŭataj de la plejparto de la politikaj partioj, ĉu dekstraj ĉu maldekstraj. Tiu peza jugo en la itala politiko tre suferigas lesbanojn kaj gejojn, kiuj devas elteni plu miopecajn kaj striktajn kondiĉojn, kaj sentas sin kiel duaklasaj civitanoj en Eŭropo.

Sed tio apenaŭ estas videbla de okuloj de geja turista, kiu en Italio povas kunligi la viziton al monumentoj kaj muzeoj de l' artaj urboj kun la plezuron ek trovi "kungefratojn".

Maŭro

¹ gej-lesba-ambaŭseksema-transgenra

Beletra niĉo

Ĉi-foje ni povas ĝui prozafjon de nia diligenta verkisto Princo (unue prezentita en lsg-ano).

Mia rakonto

Jen mi, aspektanta preskaŭ kvardekjarulo kaj ŝajne mi maljunas. Miaj gepatroj amataj – nur patro ankoraŭ vivas ĉar patrino forpasis antaŭ preskaŭ 2 jaroj. Jen mia juneco, ili estis mia juneco.

Kvankam mi matura ŝajnas aspekti, ĉe ili mi ĉiam sentis min kiel infano. Verŝajne pro tio, ke kun ili neniam mi trovis min fremda kaj ĉiam havis la eblecon kondukti kiel infano, senlime malfermita kaj sekura, eĉ se mi malkaŝus plej malhelan penson persekutan-tan mian kapon. Kiam mi staris apud ili ĉiam mi rimarkadis, kiom ankoraŭ mi devas kreski, sed ne per la korpa alteco sed per menso kaj personeco, per vivkapablo kaj lernado. Jes, ili multe instruis al mi, precipe ŝi, mia neforgesebla patrino, plej aminda virino en la mondo.

Mi havas esperon, ke kiam nokte mi rigardas plenstelan ĉielon per miaj bluaj okuloj, ŝi kiel ununura stelo ĉiam ĉirkaŭvolvas min per sia senfina amo, ke ŝi vidas min kaj inspiras, ke ŝi gvidas min daŭre tra la danĝera mondo helpante eviti malbonajn cirkonstancojn, ke ŝi senfine min protektas kiel anĝelo, kiel mia propra anĝelo. Ŝi eble nun estas tiu

anĝelo de mia infanaĝo, al kiu mi tiom ofte preĝis petante konsolon, gardon kaj protekton.

Jes, ili multe instruis al mi, ne per admonoj kaj batoj sed per rakontoj kaj ŝercoj, per saĝa parolado kaj observado de agoj konkludante kaj antaŭvidante la rezultojn. Ili estis tiom senlime malfermitaj por siaj infanoj. Ili observadis senĉese kiel kreskadis la homo en mi, kiel mi ene evoluis kaj kiuj ideoj estis plej gravaj, forigante tiujn, kiuj ne utilas en la vivo. Jen mia juneco.



Mi estas en ĝardeno ĉe mia gepatra hejmo, kiu, situanta apud la novkonstruita de mia frato, aspektas tiom maljuna kiel mi. Mi rigardas la naturon. Jen branĉo kun trezoroj de arbo. Jen floroj plenplenaj de abundaj koloroj de sunradioj fermitaj en iliaj petaloj. Jen herbetaro, tiom verda kiel espero. Jen ŝtono, kie oni povas meti la kapon sekure. Plenas mi je naturo, plenas mi, ĉar mi ja estas kampardeva. Mi observas, kiom da beleco ĉirkaŭvolvas min. Kiom da

senkondiĉa amo, vivovolo, ago kaj strebo en kreskado. Mi maljunas paŝon post paŝo, vorton post vorto. Ne gravas, se mi eble troigas. Tio min ne koncernas, mi nur strebas esti super ĝi. Mi ne kalkulu la jarojn. Ĉiuj vidas, ke mi maljunas.

Sed en mi troviĝas ĉio estinta iam ajn, ekde la komenco, ekde la praa komenco, kaj dank' al tio mi sentas min tempaltempe pli juna. Tiom juna kaj infana ĉar mi havis eblecon reveni al la jaroj dum kiuj mi sentis min tiom feliĉa kaj sekura, tiom amata kaj libera.

Jen mia juneco, mia forpasinta juneco, al kiu oni ne povas reveni, nur eble per la pensoj kaj vivantaj rememoroj ene de mi. Mi estas vojaĝanto tra la oceano, kiun oni nomas la vivo. Tro longe mi vojaĝas, tro longe, eble jam sufiĉas kvankam sekura bordo ne estis ankoraŭ atingita.

Tra la vilaĝo pigre trafluas la rivero. Ornamita laŭfluo per salikoj plorantaj, alnoj kaj arbustoj. Ĝi tranĉas ne nur la vilaĝon sed ankaŭ herbejojn kaj kampojn. La rivero, nepriskribebla belaĵo de mia juneco kaj por miaj okuloj. Mi alproksimiĝas al ĝi, klopodante tuŝeti ĝin karese per miaj fingroj, surprize kaj varme. Ĝi estas mia rivero, la rivero de mia vivo. Same ĝi estas kurba kiel la vivo. Kial mi povas miri? Mi sentas, ke ĝi apartenas al mi. Ĝi susure konfesas: "Mi apartenas al vi, mi fluas en vi". Mia rivero.

Siatempe mi ripozadis sur riverbordo aŭskultante murmuron

de fluanta akvo. Fluas rememoroj kiel la akvo de la rivero. For, foren... neniam ili revenos. Mia juneco neniam revenos same kiel la rivero neniam estos la sama kiel tiutempe. Ĝi nur restos en mi, en la bildoj kreintaj pasintece. Mi scias: mi apartenas al ĝi kun reciproko.

Mi estas maljunulo. Forflugis kvazaŭ birdoj la jaroj.

Princo

Sekvoj post la atako de pola polico

En la antaŭa numero de Forumo troviĝis raporto el Pollando de Paŭlo pri paca manifestacio kontraŭ i.a. gejo- kaj ksenofobio kaj pri la diversspecaj atakoj kontraŭ ĝi (polica perforto, manifestacia malpermeso de la aŭtoritatoj ktp). Jen iom pri kio okazis poste:

Komence de januaro la tribunalo en Poznano prijuĝis la decidojn de la urba kaj provinca estroj malpermesi la manifestacion, kaj deklaris ke tiu malpermeso estas kontraŭ la pola konstitucio. Oni atendis ke post tiu decido la polico rezignos pri la akuzoj kontraŭ la 68 arestitaj manifestaciantoj, sed bedaŭrinde la plicestro tion ne faris, kaj denove la tribunalo mem devis fari decidon. Ĝia respondo estis, ke ĝi eĉ rifuzas ekzameni la policajn akuzojn kontraŭ la manifestaciantoj. Meze de januaro la Unuiĝintaj Nacioj oficiale demandis la polan registaron pri la afero, kaj mi scias ke la ministerio pri internaciaj aferoj preparas kune kun la poznano kaj varsovia estraroj oficialan respondon. Ĝis nun mi ne aŭdis pri iu ajn rezulto de tiu preparado. Mi supozas ke la ministe-

rio ludos je tempo, forŝovante malkomfortan respondon.

Ankaŭ la parlamento de Eŭropa Unio lastatempe anoncis deklaron pri gejojfobio en la uniaj ŝtatoj. La deklaro konstatas ke estas la ŝtatoj, en kiuj oni malpermesas paradojn de egaleco, kie la aŭtoritato ne kontraŭas al agoj de perforto. De polaj medioj mi eksciis, ke ”danke al ĉiuj polaj eŭrodeputitoj” Pollando ne estas oficiale listigita en tiu dokumento. Al la deklario la unua reagis... la episkoparo de la pola katolika eklezio (surpriza, ĉu?), dirante ke ĝi estas ”atenco ne nur je la bazo de trafa funkciado de Eŭropa Unio sed ankaŭ je la homa vivo”. Nu, ŝajnas ke eŭropaj gejoj kune kun eŭrodeputitoj kaŝe murdas fidelajn ne-gejojn! Sed mi honeste aldonu, ke en la sama dokumento la pola episkoparo konstatas ke la rezolucio prave malaprobas diskriminacion kontraŭ personoj kun gejaj inklinoj. Kiel kutime la episkoparo montris sian precize klaran vidpunkton.

Nu, ĉio turniĝas, iam Pollando estis la plej libera ŝtato en Europo kaj nun venis la tempo ke aliaj nin kontrolu kaj instruu pri la rajtoj de ĉiu homo, sendepende de seksa orientiĝo.

Paŭlo

El la plumo de la nova papo

Pri la nova skribaĵo de la katolika papo, ke samseksamuloj ne plu povas esti pastrokandidatoj:

1. Spertuloj scias ke tiu papa skribaĵo havas precipe alibian funkcion: aserti ke la klerikaro estas pura. Praktike tamen malmulte ŝanĝiĝos.

2. Ĉar la eklezio volas ke ĝiaj pastroj vivu celibate kaj ĉaste, fakte egalas ĉu pastrokandidatoj estas samseksemaj

aŭ malsamseksemaj.

3. Inter la samseksemaj kandidatoj kaj pastroj eble estos pli da nuligitaj kandidatiĝoj kaj pastrigoj, kaj estos pli da rapida kaj anonima (sam)seksumado.

4. La eklezio eraras opiniante ke samseksemuloj povas malpli regi sin. Aliseksemuloj ne havas malpli da problemoj pri sinrigado, sed pli da gravaj konsekvencoj pro seksumado.

5. Se la eklezio opinias ke samseksemuloj ne estas maturaj homoj, ĝi postlumas laŭ scienca evoluo.

6. La eklezio konfuzas pedofilion kun samseksemo.

7. La biblio ankoraŭ ne konas naturan samseksemon kaj nur malaprobas ”samseksemajn perversiojn” de malsamseksemuloj.

Ni ne ekscitiĝu pri la nova teksto de senseksaj maljunaj klerikoj, opinias via

Hubertus (200), Dresden

Kampanjo kontraŭ afrikaj gejoj

Kampanjo lanĉita de la tiea bulvarda (klača) gazetaro malkaŝi la samseksemon de anoj de la politika kaj komerca elito skuas la societeton. Ĝis nun oni nomis kvindekkelkajn individuojn, kun la sekvo ke la gazeta stoko elĉerpiĝis. Samseksaj agoj en Kamerunio estas kontraŭleĝaj kaj punataj de ĝis kvin jaroj de mallibero. La ŝtata komunikada konsilio tamen kondamnas la kampanjon kiel invadon de la persona privata vivo, kaj admonas la kalumniatojn jure ekprocesi por defendi sin, kion ĝis nun neniu faris. La Kamerunia socio, kiel la plejparto de Afriko, estas konservativa koncerne akcepton de malkaŝa samseksemeo, kiu tamen private ekzistas kaj

tio apenaŭ sekrete. Eĉ ministrojn pri komunikado oni akuzas. La eldonanto de semajna gazeto defendas sian gazetan kaplinion "Gejoj troviĝas inter ni" kaj promesas pliajn malkaŝojn. Partoprenis la diskuton ankaŭ romkatolika episkopo per severa kondamno kontraŭ samseksamo kaj kritiko de permesemaj eŭropaj landoj. Pasintjare Human Rights Watch (Gardo pri la Homaj Rajtoj, <http://www.hrw.org>) kondamnis la kutimon fizike trudesplori la anusojn de arestitaj gejoj.

Brian, Kanado (el lsg-ano)

Fonto: BBC, <http://news.bbc.co.uk/2/hi/africa/4685298.stm>



Pri la Armen-Esperanta kontribuo al la Eŭrovida Kazonkonkurso

Vi pridubas la demokration de la eks-sovetiaj respublikoj, ĉu ne? Mi havas freŝan ekzemplon por pravigi tiun dubon!

En decembro 2005 mi eksciis, ke Armenio unuafoje partoprenos la Eŭrovidan Kazonkonkurson en 2006, okazontan en Ateno (Grekio) la 18an kaj 20an de majo.

Mi do kontaktis la armenan televidon, kaj ties estraranino pri internaciaj rilatoj informis min, ke mi povas submeti kazonon, eĉ se ties aŭtoro, komponisto aŭ kantonto ne havas la arme-

nan ŝtatancon, aldonante, ke la lingvo-elekto estas libera, kaj atentigante, ke la limdato por la ricevo de kontribuajtoj estas la 20a de januaro. Ŝi precizigis, ke interna jurio elektos la kanzonojn, kiuj partoprenos la armenan finalon okazontan meze de februaro 2006.

Mi tamen petis, ke ŝi sendu al mi la regularon de la armena konkurso, sed mi neniam ricevis ĝin. Spite al tio, mi kontaktis komponiston kaj kantistinon, ambaŭ armendevenajn kiel mi, por proponi al ili tiun projekton kaj ili rapide entuziasmiĝis pri ĝi.

Inspirite de la muziko kun armeneca aranĝo, mi verkis parolojn en la franca, en la internacia kaj en la armena, kaj kelkajn tagojn poste, ni registris la kazonon en la kela hejmstudio de la komponisto. La kazono titoliĝas "MER AŜĤAR E" kio signifas "Tio estas nia mondo".

La 16an de januaro mi sendis nian kontribuojn per pakajrapidsenda kompanio, informite, ke ĝi atingos Erevanon la 19an de januaro. Ĝi ja atingis la armenan ĉefurbon ĉi-tiun daton sed estis blokita ĉe la armena doganejo pro la maldiligenteco de la ricevonto! La 20an de januaro, mi provis kontakti la estraraninon pri internaciaj rilatoj pri tiu problemo sed vane. Samtage, mi ekscias, vizitante la retejon de la armena radio, ke la armena televido jam elektis kantiston por sia unua kontribuo al la Eŭrovida Kazonkonkurso, nome Andre (kies stilon mi cetere ŝatas).

Kompreneble, tio surprizis kaj malĝojigis min, sed mi rapide rememoris, ke temas pri Armenio: mi dekomence estis malfidema pro la nericevo de la regularo kaj mi tuj komprenas, ke ĝi neniam ekzistis! La 30an de januaro, mi ricevis la konfirmon, ke la senditaĵo

estis ricevita per subskribo de la prezidanto de la armena televido!

La 6an de februaro, mi ricevis retroŝton de la estrararino pri internaciaj rilatoj kaj Armenia delegaciestrino en Ateno, informante, ke nia kanzono ne estis elektita, sed gratulante nin pro la rimarkinda laboro. Ŝi klarigis, ke la malfrua konfirmo pri la armena partopreno en la EKK malebligis ilin organizi televidotan Nacian Finalon pro la unuafojeca malsperteco. La ĵurio do elektis komponaĵon de Armen Martirosyan, fondinto de la Armena Ĵazbando, aranĝitan de Ara Torosyan. La liriko pluverkendas kaj mi konsilis, ke almenaŭ ties duono estu en la armena lingvo, por allogi la televidbalotojn de la armena diasporo...

Tio verdire ilustras la mankon de travidebleco (por esti ĝentila) de la armena socio, sed mi fieras, ke mi sukcesis aŭskultigi kanzonon, eĉ parte, kantitan en Esperanto!

Francis (297)



Re-prezentado de la estraro

Jam en FORUMO 118 ni prezentis la estraron, sed ĝi nun havas novan anon, Torstein, sekve ni faras re-prezenton:

Prezidanto: Arnold de Novjorkurbo. Mi esperantistiĝis per esperanta vojaĝo al Ĉinio en 1981, kaj mi malkovris LSG-on dum la budapeŝta UK en 1983. Mi estis vicprezidanto de la Esperanto-Societo de Novjorkurbo (ESNY) dum kelkaj jaroj. Mi estas konstanta parto-

prenanto de la sep Aŭtunaj Renkontiĝoj de Esperantistoj sur Okemo-Monto, Vermonto, dum la dua semajnfino de Oktobro; ĝi servas al Esperantistoj tra orienta Kanado kaj nordorienta Usono.

Sekretario-kasisto Rolf: Mi naskiĝis en Cottbus en orienta Germanio kaj nun vivas en Dresdono. Mi komencis lerni Esperanton kiel infano en 1973. Membro de LSG mi estas ekde 1981. Profesie mi laboras en imposta kancelerio por eviti, ke homoj pagas tro da mono al la ŝtato.

Estrarano pri varbado Francis: Mi estas armenida franciano, naskiĝinta en Parizo la 25an de junio 1962, loĝanta tie, esperantistiĝis en 1987 kelkajn monatojn antaŭ la centjariĝjubileaj kongresoj en Pollando: la IJK en Krakovo kaj la UK en Varsovio estis la unuaj kongresoj, kiujn mi partoprenis. Mia unua kontakto kun LSG okazis dum la UK en Varsovio. Mi estis elektita LSG-estrarano en 1996, 2001 kaj 2005. Mi estas kantemulo kaj regule aperas sursceneje dum la internaciaj artaj vesperoj de la UK-oj.

Estrarano Torstein: Mi vivas en la Norvega urbo Trondheim kune kun mia edzo Christian. Ni konatiĝis kun Esperanto meze de la 80aj jaroj. La agrablan geĵreton de LSG ni malkovris dum la kongreso en Bergen en 1991. Per ĝi ni akiris multajn amikojn kaj pro tio ankoraŭ interesas nin sufiĉe ofte viziti la universalajn kongresojn de UEA. Ĉar ni kutime partoprenas tiujn kongresojn, kaj ĉar mi prezidis la Norvegan Esperantistan Ligon dum ok jaroj, mi ankaŭ akiris la honoron reprezenti Norvegon en la komitato de UEA. Profesie mi laboras pri informado en la ŝtata instanco "labora inspekcio", kiu okupiĝas pri sekureco kaj sano en la labora vivo. □